



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Junio : 2 2022

ARGENTINA JURA INSTANCO PRISTUDAS ĈU GERILA ATENCO POVAS ESTI TAKSATA KIEL GRAVEGA DELIKTO KONTRAŬ LA HOMARO

La 2-an de julio de la jaro 1976, kiam la prezidantino de Argentino estis S-ino Isabel Perón, bombo eksplodis en la sidejo de sekreta servo de la argentina polico en Bonaero. 24 homoj mortis, aliaj 60 restis vunditaj. La respondeculoj de tiu atenco estis membroj de la Montonera Armeo, gerila grupo fondita en Argentino komence de la 7-a jardeko.

Kvar monatoj post tiu fia agado okazis militista puĉo kontraŭ la prezidantino Perón. La militistoj ne sendis la respondeculojn de la atenco en juran instancon, ili decidis torturi kaj murdi la gerilanojn. En la jaro 2006 advokatoj de la eksaj militistoj, tiuj kiuj torturis la membrojn de la Montonera Armeo, prezentis antaŭ tribunalo la kazon pri la atenco, tamen la juĝisto rifuzis pristudi la aferon, ĉar ĝi okazis antaŭ multaj jaroj, do, la krimo jam preskriptiĝis. Tio estas, la tempo-paso okazigis ĉeson de punebleco de tiu krimo.

Tamen, la Federala Kortumo de la urbo Bonaero ĵus malfermis proceson pri



Membroj de la militistaj juntoj kiuj regis Argentinon de 1976 ĝis 1982 estis kondamnitaj.

tiu atenco. Juĝistino María Servini de Cubría decidis, ke oni devus priesplori la aferon, ĉar laŭ ŝi, ne nur estas gravegaj deliktoj kontraŭ la homaro tiuj kies respondeculoj estis militistoj, sed ankaŭ tiuj kaŭzigitaj de la gerilanoj. Oni devas memori, ke gravegaj krimoj kontraŭ la homaro preskriptiĝas neniam.

Nuntempe en Argentino 764 militistoj plenumas sian kondamnon pro tiuspecaj deliktoj, 579 el ili en sia propra hejmo. Tamen, neniuj gerilanoj estis kondamnita, ĉar oni taksis, ke tiuj fiaj agadoj jam preskriptiĝis. Ĉi tiu jura taksado ĵus ŝanĝiĝis okaze de la nova decido de la Federala Kortumo de Bonaero.

Vorto de la Semajno

Asigni: Oficiale alvoki antaŭ tribunalon

Asigno: Dokumento, per kiu oni asignas ion aŭ iun

Asignito: Homo kiu oficiale estas alvokita ĉeesti tribunalon.

Asignisto: Jura oficisto, kiu transdonas la formulon de asigno al la asignito.

Bankasigno: Skriba komisiio kaj rajtigo al banko pagi, por la konto de la komisiinto, al la montrita persono la difinitan sumon skribitan en la dokumento.

Sinonimoj: *Mandato.*



De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos en la kanada urbo Montrealo la 107-a Universala Kongreso de Esperanto. Kadre de ĝi devos okazi la ĝenerala asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se Vi estas membro aŭ simpatianto de nia asocio, bv. anonci vian partoprenon. Dankon!

